
# Sennacieca revuo

Sennacieca Asocio Tutmonda
67, Av Gambetta FR - 75020 Paris



Raŭmismo kaj Postmodernismo

Religio kiel faktoro de progreso

Esperanto - pri kio

Lorca

Erasmo de Roterdamo

Pirenea urso

La abato kaj la klerulino

La laboristaro kaj la esperanto-movado

La frenezulino

Sennacieca Revuo estas eldono de SAT -- 8€

# Enhavo

3- Esperante pri kio, efektive ?

7- Postmodernismo, postcionismo, raŭmismo, ktp…

12- La laboristaro kaj la esperanto-movado

20- Religio kiel faktoro de progreso (en la pasinteco)

22- Eklezioj kiel faktoro de malprogreso (ĉiam)

24- Pirenea urso, la plej dika sovaĝa mambesto en Francio

29- Iom pri Deziderio Erasmo el Roterdamo

33- La abato kaj la klerulino

37- La popolstilo en la poezio de Lorca

45- La frenezulino

**Sennacieca Revuo**

Oficiala organo de S.A.T.

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1 47 97 71 90
Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.;
TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org.; Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : satx-s
Plenum-Komitato de SAT :
Prezidanto : Jakvo Schram
Ĝenerala Sekretario : Vinko Markovo
Kasistino : Franjo Leveque-Provost
Membroj: Guy Cavalier, Arturo Prent,Thérèse Sabatier

Redaktantoj - Kreŝo Barkoviĉ, Robin Beto, Vincento Charlot, Tonyo Del Barrio, Jomo Ipfelkofer, David Kelso, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Franciska Toubale. Enpaĝigas Jakvo.
Ekspedejo de Sennacieca Revuo: adreso de S.A.T..
Tekstojn vi sendu al: Sennaciulo@telenet.be - aŭ al Jakvo Schram Hof ter Bekestraat 49. BE-2018 Antwerpen

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas unu foje jare kiel suplemento de Sennaciulo.
Le directeur de la Publication: Jacques Bannier; Prezo 8€
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567

# Esperante pri kio, efektive ?

Esperanto estas la sola laborlingvo de SAT, kiu tial estas esence *per*-esperanta organizo, kaj tia estas ekde sia fondiĝo antaŭ 90 jaroj. Nia lingvo, kiel scias la plejmulto da esperantanoj, nomiĝas 'Esperanto' kvazaŭ hazarde. La *Unua Libro* per kiu Ludwik Zamenhof lanĉis sian projekton, titoliĝis 'La Internacia Lingvo', aŭtorita de 'd-ro Esperanto', t.e 'kiu esperas'. Oni do parolis pri 'la lingvo de d-ro Esperanto', kio baldaŭ iĝis 'la lingvo Esperanto'. [Paranteze: la unua neologismo en nia lingvo, ĉar la radiko *esperant'* ne troviĝas en la *Unua Libro* !]

Tiu nocio, do, 'esperi, esperanti' troviĝis en nia lingvo-komunumo ekde la komenco. Tamen, kion ni esperas? Kion esperis Zamenhof? Ĉu nur ke la lingvo estu adoptita, la *Fina Venko*? aŭ ĉu ion pli ampleksan? Ĉu efektive Esperanto estas nur komunikilo, adoptinda de la internaciaj instancoj, aŭ ĉu ĝi estas pli ol tio; ĉu ĝi kunmetas ideojn, idealojn, specialajn al si? Ĉu efektive lingvo, ajna lingvo, povas ekzisti sen specialaj konceptoj, valoroj, idearo, ideologio eĉ ? [En ĉi kunteksto mi uzas la vorton 'ideologio' ne en politika senco, sed pli ĝenerale, kiel ekzemple en 'la ideologio de scienco', 'la ideologio de komerco'.]

Kiam George Orwell, anglalingva aŭtoro de '1984' kaj 'Bestofarmo', interalie, vivis en Parizo dum la 1920-aj jaroj, li loĝis unue ĉe sia onklino, Nelli Limouzin, la edzino de Eŭgeno Adam, nia Lanti. Post kelkaj semajnoj, tamen, li ekserĉis alian loĝejon, ĉar Lanti insistis hejme paroli nur Esperanton, ne la francan. Poste Orwell deklaris: "Esperanto! Ĝi estas ne nur lingvo, ĝi estas *ideologio* !"

Iuj fakuloj ja argumentus ke lingvo kaj ideologio estas nedisigeblaj, ĉar ili estiĝis samtempe, kiam la homaro ekkapablis pensi *simbole*, t.e. kiam ni ekpovis pensi pri malsato kiam ni ne malsatas, pri tempesto kiam sunbrilas. Tia simbola pensado ebligis al la homa specio paroladon pri temoj aliaj ol la ĉi-momentaj sentoj; tiel ekkreiĝis la grandaj mitoj, la bazo de religio, de filozofio, de historio, eĉ finfine, de scienco. Tial mi proponas ke lingvo, ĉiuj lingvoj, estas ne nur komunikiloj, sed kunportas karakterizajn ideojn kaj valorojn… unuvorte, kulturon.

Mi unue konsciis tion kiam, ankoraŭ sufiĉe juna, mi studis la latinan lingvon. Ni renkontis la vorton *pietas, pietatis*, kutime tradukata al 'pieco'. Tamen, nia instruanto klarigis ke, kvankam oni uzas la vorton tiusence en kristana kunteksto, la origina signifo estis tute alia. Se mi bone memoras, rilatis al ia deca respekto al la tradicioj, la moroj, de la komunumo, de la familio, de la antaŭuloj. Ne ekzistas rekta ekvivalento en la hodiaŭa angla lingvo, verŝajne ankaŭ ne en Esperanto, ĉar tiu ideo, tiu koncepto, apartenis ĝuste al la latina kulturo de antaŭ 25 jarcentoj. Simile en ĉiuj lingvoj. En la angla, *level playing-field* - laŭlitere 'ebena ludokampo' - havas signifon multe pli vastan ol tio. En la franca, *le mot juste* havas signifon pli ampleksan ol 'la ĝusta vorto'. Kaj en la itala, *la bella figura* - la bela formo aŭ aspekto - kuntrenas tutan vivfilozofion! Same en ĉiu lingvo, en ĉiu kulturo. Ĉu ankaŭ en Esperanto? Ĉu nia lingvo implicas iujn valorojn, ideojn specialajn, aŭ ĉu ĝi esprimas nur la ideojn, la valorojn de aliaj kulturoj ?

Pri tiu demando Zamenhof mem tute certis: ne estis akcidento ke li elektis la nomon 'Esperanto'. Li tutanime esperis mondon pli pacan, pli bonvolan, pli justan. Kiel ni ĉiuj scias, Zamenhof junaĝis en Bjalistoko. Laŭ la legendo, li

ankoraŭ tre juna rimarkis ke en la urbo estis kvar distingeblaj komunumoj, kiuj ofte kverelis, batalis eĉ, inter si: hebreoj, poloj, rusoj kaj germanoj. Nu, dum jaroj mi demandis min, kial li menciis tiujn kvar, ellasante la belorusojn kaj la litovojn, kiuj sendube ankaŭ troviĝis en Bjalistoko, sufiĉe multnombre, mi supozus. Tiam, pripensante tiun temon, mi konstatis ke la kvar nomitaj - hebreoj, poloj, rusoj, germanoj - posedis *kaj* proprajn lingvojn *kaj* proprajn religiojn. La belorusoj, kontraste, dividis kun la rusoj la ortodoksan religion (la belorusa lingvo, cetere, tre parencas la rusan), dum la litovoj dividis kun la poloj la katolikan religion (la litova lingvo tamen malmulte parencas la polan!) Por Zamenhof, mem hebreo, la kunstaro de lingvo kaj religio ege gravis, ĉar por hebreo en tiu tempo, en tiu loko, la aparta identeco konsistis en *kaj* ilia aparta lingvo - la jida - *kaj* ilia aparta religio, la juda.

Jen la modelo en la menso de juna Lejzer-Ludwik: gento - lingvo - religio. Li eĉ faris - rigardu la Ekzercaron - klaran distingon inter ruso (gento-lingvo-religio) kaj rusujano (ruslandano): iu daŭre loĝanta en Ruslando sed ne nepre rusa laŭ gento, lingvo kaj religio.

Tial, por Zamenhof estis nedisigeblaj lingvo kaj religio - kaj religio estas speco de ideologio. Ekde la komenco, Esperanto estis por li veturilo, nura veturilo, por 'neŭtrale homa' (lia ŝatata esprimo) religio, aŭ filozofio - la Homaranismo. Notindas ke por Zamenhof la distingo inter religio kaj politiko estis malpli klara ol por ni hodiaŭ. La judismo, precipe en orienta Eŭropo en tiu tempo, estis institucio kaj religia kaj socia. La patro de Ludwik - Mark, aŭ Mordeĥai - laŭ Zamenhof estis 'ateisto' (eble liberpensulo, pli ĝuste?), tamen eminentulo en la loka hebrea komunumo, kiu regule oficis en la sinagogo. Kaj la juda biblio - la Torao - parolas pri socia ordigado - centoj da leĝoj, reguloj, pri ĉiu aspekto de la komunuma vivo - pli ol pri teologio. Zamenhof, cetere, ofte diris ke Homaranismo ne estis rivalo al la grandaj religioj, sed iaspeca filozofia, ideologia *ponto* inter la religioj. Li asertis ke kaj kristanoj kaj islamanoj, kaj judoj kaj hindoj, povus esti samtempe 'homaranoj', iom kiel estis ĉiuj 'kristanoj' katolikoj, ortodoksuloj, luteranoj, kalvinistoj, koptoj kaj ceteraj.

Verdire, li neniam tre klare detaligis tiun homaranismon, sed ĝi iom similas la hodiaŭan 'universalismon', la nocio ke troveblas en ĉiuj grandaj religioj, kredsistemoj, ideologioj, filozofioj, tra la jarmiloj, ia kerna interkonsento pri ĉefaj etikaj principoj: bonvolo, toleremo, justeco, solidareco kaj tiel plu.

Pri ĉio tio Zamenhof volis paroli en Bulonjo-ĉe-maro en 1905; refoje en Ĝenevo en 1906 kaj preskaŭ ĉiujare ĝis 1914, kiam li volis okazigi 'Kongreson de Neŭtrala Religio' en Parizo, paralele kun la Universala Kongreso, kiu eventuale ne okazis pro la mondmilito. La 'realistoj' de la movado, tamen - grandparte francoj kiuj tre konsciis la hebreecon de Zamenhof kaj ties signifecon en okcidenta Eŭropo - efektive malpermesis ke li parolu pri temoj religiaj aŭ politikaj, tiel ke li devis eldoni siajn ideojn broŝurforme, en 1906, sub kaŝnomo. Tamen, oni ne malpermesis la himnon 'La Espero', en kiu troviĝas efektive la esencaj elementoj de la tiel nomata 'Interna Ideo', ia minimuma versio de homaranismo: paco, tutmonda frateco, interhoma amo kaj cetere.

Depost Bulonjo, la unua internacia Esperanto-kongreso, la ĉeffluo de la Esperanto-komunumo - post 1908, efektive UEA - estas oficiale neŭtrala pri demandoj politikaj, religiaj kaj sociaj. Sekve, maloftas tie diskutado pri ideologio. Jes, Edmond Privat esprimis kelkajn ideojn pri Paco laŭ la gandia modelo, pri mondcivitaneco kaj



mondfederismo, sed malmulte, malofte … kaj mallaŭte! Ivo Lapenna, domina figuro dum tridek jaroj, proponis en 1947 ion nomitan 'aktiva neŭtralismo', kio ŝajne konsistis el subteno al demokratio kaj homaj rajtoj, kaj oponado al totalismo. Mi citas: "Respekto de la homrajtoj estas por nia laboro esenca kondiĉo". Interese, li tion diris pli ol jaron antaŭ la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj, publikigita fine de 1948. Tamen, Lapenna ne evoluigis tiujn ideojn, eble ĉar li iom embarasiĝis pri la nocio de neŭtralismo.

Nedisputeblas do ke la ĉefa ideologo en la historio de Esperanto estas nia propra Lanti, Eŭgeno Adam. Plej certe, Lanti estis maldekstrulo, dum kelka tempo komunisto, fervora kontraŭ-kapitalisto kaj sennaciisto, kiu *iom ĝenerale* favoris *ian* 'revolucion'. Ni havas plej klaran ideon pri kion oponis Lanti - *l'Anti*, kontraŭulo - iom malpli klaran komprenon pri kion li proponis kiel anstataŭon. Pro variaj kialoj, do, Zamenhof, Privat, Lanti kaj Lapenna ĉiuj malprecizis pri ideologio.

Krom tiuj grandiozaj figuroj, tamen, ni povas rigardi ankaŭ la diversajn deklaraciojn kaj manifestojn de esperantaj kongresoj, kaj neŭtralaj kaj tiuj de SAT, tra la jardekoj. Tiuj el la neŭtralaj kongresoj - Bulonjo, Ĝenevo, Madrido, Prago, kaj mi aldonu Frostavallen, Tyresö kaj Raŭmo - estas tre ĝeneralaj: estus malfacile trovi homon kiu sincere kaj serioze obĵetus ilin. La plej lasta, la Manifesto de Prago, deklaras la ĝismortan engaĝiĝon de la Esperanto-movado al demokratio, transnacia edukado, pedagogia efikeco, plurlingveco, lingvaj rajtoj, lingva diverseco kaj 'homa emancipiĝo'. Oni forgesis mencii nur dorlotbestojn, ĉu ne vere ?

La deklaracioj de la SAT-kongresoj, kompreneble, estas konstante pli specifaj kaj pli partiaj. Estus interesa projekto, studi ĉiujn kongresajn deklaraciojn de SAT, dum naŭ jardekoj, por konstati kia la ideologio tie spegulita… ĉar nia ideologio estas ĉiam implicita, ĉu ne, ne specifigita?

Ĉu nepre, tamen ? Ĉu ne eblas identigi kaj envortigi la ideojn, la valorojn